


# STARTO



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

1975 1 (47)



~ 48

Esperanto - rondo  
Vyškov, Školní 4



**INTERHELPO** založili stoupenci  
mezinárodního jazyka (K článku na str. 3)

# Z PLÁNU PRÁCE Č M R

/El la Jarplano de Čeňa P A C K O N S I L A N T A R O /

Celá činnost ČMR bude co nejtěsněji spjata s oslavami 30. výročí osvobození Československa Sovětskou armádou. Mírové rady všech stupňů přispějí k tomu, aby v centru pozornosti při vysvětlování otázek mírové politiky byly především následující tematické okruhy:

1. Mírová politika SSSR.
2. Mírová politika ČSSR.
3. Základní otázky boje za mír.
4. Zahraničně politické události, mírové aktivity socialistických států a pokrokových sil světa.

Jednotlivé části plánu práce:

I/ Podíl na oslavách 30. výročí osvobození Sovětskou armádou

- ČMR uskuteční republikové setkání měst, obcí a závodů, jež jsou nositeli Čes. ceny míru a jimž bylo propůjčeno vyznamenání za boj proti fašismu, v dubnu tr.
- VI. republikové setkání JZD s mírovým názvem /duben/
- semináře v krajích a okresech k mírové politice SSSR
- včasné vydávání příslušných argumentačních materiálů, jež poslouží pro práci v široké veřejnosti.

II. Přednášková činnost

Pro vyzbrojení lektorů a referentů svolá ČMR dva republikové ideologické semináře s cílem vysvětlit:

- význam a obsah čs.-sovětského přátelství pro budování socialismu, bezpečnost a mír v ČSSR /leden/
- podstatu mírové politiky ČSSR a její podíl na prosazení leninských zásad mírového soužití /říjen/.

III. Mírová práce - součást činnosti celé Národní fronty

ČMR a mírové rady všech stupňů přispějí k vytvoření takových vztahů a orgánů a organizací NF, které budou zárukou toho, že se věc boje za mír stane záležitostí všeho čs. lidu:

- ČMR bude přicházet na orgány NF s iniciativami a pomáhat při koordinování mírových akcí a organizování soustavné výchovy k míru,
- bude se podílet na organizování solidárních projevů s lidem zemí bojujících proti světovému imperialismu,
- ve spolupráci s ČSŽ oslaví Rok žen akcemi, které doloží podíl a význam žen v boji za mír a pokrok,
- přispěje při své agitační a propagační práci k úspěchu V. celostátní spartakiády,
- aktivně se zúčastní významných politických výročí a akcí, jako jsou Mezinárodní pamětní dny odboje, 58. výročí VRSR, mírové slavnosti, výročí bratrských socialistických zemí aj.

IV. Práce mezi mládeží

ČMR se v těsné spolupráci se SSM zaměří na:

- pořádání besed, tribun otázek a odpovědí, přednáškových cyklů, vysílání lektorů do útvarů politického vzdělávání mládeže, k diskusím mezi pionýry, k besedám v pionýrských táborech,
- svolávání krajských aktivů, na nichž se bude za účasti KVSSM jednat o vzájemné spolupráci a podílu mírových rad při internacionální výchově mládeže,
- organizování soutěží "V míru jsme se narodili, za mír chceme bojovat", fotosoutěže mladých ap.,
- přípravu tradičních mírových ohnů.

V. Práce na závodech a mezi vesnickým obyvatelstvem

- trvale pečovat o kolektivy BSP a JZD s mírovým názvem
- vycházet z Provolání ÚV KSČ, vlády ČSSR, ÚRO a ÚV SSM k rozvoji iniciativy pracujících na počest historických výročí.

VI. Kulturní činnost

- využívat všech tradičních a osvědčených kulturně společenských akcí v okresech a krajích k mírovému působení v nejbližší veřejnosti /festivály, přehlídky a pod./
- organizovat akce k popularizaci osobností zařazených mezi světové kulturní výročí,
- připravit náměty pro spolupráci se Svazem spisovatelů a s dalšími tvůrčími svazy, institucemi a zařízeními,
- vytvářet podmínky pro širší využití mírových a protiválečných výtvarných, literárních a hudebních děl,
- vydat materiály pro oslavy osvobození a pro mírové slavnosti.

## Interhelpovci odjeli před 50 lety

Z popudu IV. kongresu Kominterny a jeho rezoluce o proletářské pomoci sovětskému Rusku a na základě směrnic I. sjezdu KSČ vznikla 1. května 1923 v kroužku přátel mezinárodního jazyka v Martině myšlenka založit průmyslové družstvo Interhelpo. Název pochází z časopisu Revue Internacional, v němž byla výzva k technické pomoci.

Ideové zaměření a náplň práce přilákaly četné stoupence, protože v tehdejší buržoazní republice, kde vládla nezaměstnanost, družstvo poskytovalo dobrou životní perspektivu. Vstup do družstva však byl podmíněn zaplacením částky 5000 korun. Pro mnoho lidí to bylo víc než celý majetek. Z peněz, které získali prodejem inventáře aj., interhelpovci postupně zakoupili strojní zařízení pro textilní závod, zemědělské stroje a konečně 29. března 1925 odjel ze žilinského nádraží za zvuků Internacionály první vlak.

Ve čtyřech etapách odjelo celkem 1078 členů družstva do sovětské Kirgizie, kde v okolí města Pišpek /dnes Frunze/ postavili z vlastní chodu prostředků řadu závodů, jež tato země dosud neznala: první elektrárnu a textilku, slévárnu, továrnu na nábytek, množství řemeslnických dílen a podíleli se na výchově kvalifikovaných kádřů této sovětské republiky. Družstvo bylo vyhodnoceno jako nejlepší v celém SSSR.

Desáté výročí Interhelpa se stalo příležitostí k radostné bilanci. Přijeli hosté z Československa, mezi nimi i novinář Julius Fučík. Byl tak nadšen prací Interhelpovců, že o nich napsal román. O osudu jeho rukopisu se bohužel nezachovaly žádné hodnověrné zprávy.

Interhelpo zaniklo po téměř dvacetileté činnosti v roce 1943 přechodem závodů do správy a řízení státních orgánů Kirgizské SSR. Za druhé světové války se 50 členů družstva přihlásilo v Buzuluku do čs. vojenské jednotky. Jedenáct jich padlo v bojích za osvobození vlasti. Někteří členové se po válce vrátili do vlasti, jiní žijí v Kirgizii se svými dětmi i vnuky dodnes.

Interhelpo patří k nejvýznamnějším vystěhovaleckým akcím světového proletariátu do Sovětského svazu a napsalo jednu z nejkrásnějších stránek čs.-sovětských vztahů.

J. Vlasák

(Resumo : rememoro pri la fondo de la kooperativo INTERHELPO en Kirgizio, USSR, antaŭ 50 jaroj, laŭ iniciato de ĉs. interlingvanoj. Pliaj detaloj traktas tiun ĉi temon artikolo en ĉs. PACO /1973/.

## Bazo por ĝusta informado

La temo Informado pri kaj per E-o tuŝas la tutan interlingvan teron, kaj la teorion kaj la organizan. Neniu fakto pri Esperanto, neniu atingo per ĝi indas resti izolita.

Informi pri Esperanto sen klarigi ĝiajn rolojn kaj mision en la mondo diverslingva estas nura reklama tumulto de iu fermita societo aŭde strangaĵoj. Konatigi sole la lingvon estas rifuzindaĵo. Nur la ĉiutaga evento-svarmo en la internacia vivo povas esti fidinda materialo, el kiu ni ĉerpu la objektivaĵajn informojn. Ĝi amasigas "brulŝtiparon", sur kiu oni povas varmigi ankaŭ la "lingvan supon".

La informanto, kies scioj pri Esperanto limiĝas je dekseks reguloj, aŭguras malutilon por la afero. Almenaŭ supraĵe li devus scii, kiamaniere la internacia lingva politiko funkcias, kia estas rilato inter la sciencoteknika evoluo kaj la interlingvo, kiuj estas tendencoj en la integriĝo-evoluo kaj kiamaniere la interlingvistaj organizaĵoj povas profiti el ili.

Prave diris tre merita esperantisto, ke se UEA estus nur Klubo de filologoj, UNESCO agenaŭ estus konsiderinta ĝin per sia rezolucio antaŭ dudek jaroj. Ankaŭ la funda informo kaj dokumenta aktivecoj de UEA ŝatempe helpis atingi la rekonon de la supera kultura organizaĵo. En lerta kombino kun landaj informaj fakoj povas esti kreata konstanta premo sur la informa merkato. Malvarma aŭ indiferenta sinteno al Esperanto de ekstere fontas grandparte el nesufiĉa informiteco. Sed tion devas preventi jam la lokaj grupoj per daŭra agado tiurilata.

La sistema informado neeviteble bezonas fiksan organizan bazon/ofte pli bonvenus simpla cirkulero ol "luksa" gazeto/. La landaj organizaĵoj devus observi pri la klerigado al siaj respektivaj aktivuloj, pri la sistema konsciigado de siaj anoj kiel vastigantoj de la ideo Esperanto kaj evidentigi tian postulon en siaj pedagogiaj kaj lernejaĵaj programoj.

La Centro devus ne nur kolektadi kaj dokumentadi la informojn akiritajn, sed ankaŭ klasifi kaj komenti ilin. Kaj por tiu celo certaj fakaj aŭ sciencaj komisionoj devus adekvate kaj laŭsisteme eklabori, man-manen kun efikaj informaj kaj dokumentaj fakoj. La internacia kunlaboro ankaŭ sur tiu ĉi kampo estas ekster ajna dubo kaj en ties kadro ĉiufanka subteno al CED. Oni povas agi en ĉiuj direktoj sole kun efika kaj fidinda apogiĝo sur la faktoj. Alie multaj klopodoj estas vanaĵ kaj la energio elspezata perdiĝas sen utilo.

Aproprigi Esperanton al ĉiuj oni ne kapablas, sed oni povas efike argumenti antaŭ la politikaj kaj ŝtataj institucioj pri la neevitebleco de tia faro. Nature, en la socialisma socio la internacia lingvo fariĝas ilo de la klaso, kiu iam decidis ankaŭ pri la estonteco de Esperanto. Laŭ la dinamika kresko de la movado en la socialismaĵaj landoj oni povas jam hodiaŭ aserti, ke ĝi estos decido pozitiva. O.Knīchal

PO STOPÁCH INTERHELPA - o tomto tematickém zájezdu do střední Asie jsme Vás informovali v minulém čísle. Vzhledem k výrobní lhůtě časopisu jsme termín zaplacení zálohy stanovili do konce března 1975. Zájemci, kteří zaplatí zálohu, nemusí mít obavu, neuskuteční-li zájezd, bude jim vrácena. Pište tedy na složenku: účel platby - zájezd SSSR, č.konta SBČS Praha 2, 02-4632-70.



V rámci X.semináře esperantské mládeže v Hejnicích /leden 1975/ se uskutečnila pracovní schůzka Komise pro práci s mládeží ÚV ČES, která řešila některé důležité problémy týkající se mladých esperantistů. Komise pověřila organizací XI.semináře, který se bude konat 2.-4. května tr., Esperantský kroužek obránců míru v Mělníku. Mělničtí ihned započali s organizačními přípravami; půjde totiž o dosud největší seminář tohoto druhu. V těchto dnech již byly vytištěny pozvánky a přihlášky propagující seminář tak, aby mohla být zajištěna co největší účast.

Komise dále konstatovala, že mladí esperantisté nevyvíjejí dostatečnou aktivitu při zakládání Interklubů SSM. V této době pracuje pouze šest Interklubů SSM s esperantskými sekcemi a jsou zakládány další. Věříme, že v blízké budoucnosti se tento relativně nízký počet zvětší. Mnoho mladých esperantistů si bohužel ještě neuvědomuje, že Interkluby SSM s esperantskými sekcemi jsou jedinou z á r u k o u m a s o v ě j š í h o r o z š í ř e n í m e z i n á r o d n í h o j a z y k a m e z i m l á d e ž í . /jv/

## Adresát: FOND SOLIDARITY

Český esperantský svaz P r a h a

Zasíláme Vám výtěžek zvláštní tomboly na mikulášském večeru Klubu esperantistů při KASS v Jablonci n.N./m.s.ČES/ dne 6.prosince 1974

v částce Kčs 308,70 /třista osm korun/,

která má být podle rozhodnutí naší prosincové členské schůze a podle Vaší výzvy věnována na zakoupení potřebné literatury pro esperantské hnutí ve Vietnamské demokratické republice a na Kubě. Věříme, že tyto částky předané v hotovosti použijete podle svého uvážení a znalostí potřeb tamních esperantistů.

Miloslav J í r a  
předseda

Josef N o v á k  
jednatel


Vážení čtenáři, s novým rokem se vám STARTO představuje v nové podobě. K tomuto kroku nás vedla jednak potřeba sjednotit formát svazových publikací, mezi kterými jsou Panorama a Medicinistaj Informoj, jednak snaha přiblížit se převládající mezinárodní normě. Závažný je i důvod ekonomický - fotografickým zmenšením textu ušetřit papír a tím i místo. Počet čísel bude z výrobních i distribučních důvodů omezen na šest, není to však nikterak na úkor rozsahu, který se naopak ještě zvětší. Šest 16-stránkových čísel přinese více čtení než dosavadních osm většinou po osmi stranách. Věříme, že tyto změny přijmete s porozuměním. Počínaje tímto číslem bude každý kroužek na Slovensku dostávat zdarma 2-3 výtisky, neboť Esperantisto Sloveka přestal vycházet. Zájemci o odběr ze SSR (hromadný či individuální) se mohou přihlásit na sekretariátu ČES.

## Renkontiĝo en Vsetín preparata...

La II-a renkontiĝo de ĉefaj kaj slovakaj esperantistoj okazos inter la 26a kaj 29a de septembro 1975 en Vsetín. La renkontiĝo estas parto de solenaĵoj okaze de la 30a datreveno de la liberigo de Ĉeĥoslovakio. Ĝi estas la ĉefarango de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en la kurranta jaro.

Same kiel antaŭ kvar jaroj kiam en Vsetín okazis la I-a renkontiĝo ĉeestita de 350 partoprenintoj el 14 landoj, ankaŭ la nunjara venas adekvatan intereson, kaj oni do supozas rekordan nombron da ĉeestantoj.

Ĉiuj programeroj okazos en la Kulturdomo "Sklář", Vsetín - Orada. Varia programo antaŭvidas alparolojn de la asociaj reprezentantoj - ĈEA kaj AE SSR - porpacan forumon, konkursojn oratoran kaj deklaman konatigan vesperon, kie ludos Esperanto-kvarteto el Trenčín. Folkloro ensemblo Jasenka, laureato de ŝtataj premioj, prezentos sian arton. Oni povos viziti ekspozicion de pentraĵoj, skulptaĵoj far esperantistaj artistoj aŭ la urban galerion, ĝui belaĵojn de la malnova kaj la nova urbo-partoj. Kaj la lastan tagon ekskursi tra bela montara regiono Valaĥio.



## INVITO AL SLOVAKIO

Orientslovaka teritoria Esperanto-Komitato /Esperanto-Klubo, 040 Ol Košice, Rooseveltova 5/ organizas jenajn aranĝojn /post februaro 1975/ :

- 6-an KONGRESON de AE SSR en Alta-Tatra-montaro, Tatranská Lomnica /inter la 25.4. kaj 27.4./ Kongreskotizo /250 Kčs/ inkluzivas : loĝejon, manĝejon kaj organizaĵajn elspezojn.

- SOMERAN Esperanto-lernejon en Košice-Opátka /SELKO/ inter la 2a kaj 16a de aŭgusto. Kotizo 850 Kčs /por eksterlandanoj 950 Kčs/.

- TURISMAN SEMAJNON en Alta-Tatra-montaro aŭ en la Slovaka Paradizo /inter la 17a kaj 23a de aŭgusto/. Kotizo 500 Kčs.

Ĉiuj interesitoj bv. tuj sendi antaŭaligilon laŭ la supre menciita adreso !

## EK Brno en ciferoj

En la pasinta jaro okazis 50 klubaj kunvenoj, 1 kiuj 41 kun prelegoj /10 kun diapozitivoj/, unu koncertvespero, 4 filmvesperoj /ĉiam kun filmoj en E-o/. Okazis 2 kursoj kun 18 partoprenintoj, venis 198 leteroj, 418 leteroj estis forsenditaj /135 al ĵurnaloj/. Oni trovis 23 informojn enpresitajn, kvankam aperis pliaj. Venis 51 presajoj, estis forsenditaj 2700 presajoj. Aperis 6 n-roj de Bulteno - eldonkvanto 600 ekz. La grupo entreprenis 3 ekskursojn : al Opava, Mělník kaj Hungario. Kvar anoj instruis en SET, 2 membroj prelegis en 4 kluboj kaj 1 en eksterlando. Estis akceptitaj gastoj el Bulgario, Sovetio, GDR, Pollando, FGR kaj Danlando. Du membroj laboras super teknikaj vortaroj, unu estas aŭtoro de nova lernolibro de E-o unu membro sisteme tradukas. La klubo abonas 13 gazetojn, kelkajn du ekzempleroj, en la biblioteko estas jam pli ol 900 volumoj. LG Brno havas entute 264 membrojn, el kiuj ĉ. 140 aliĝis al ĈEA, la ceteraj estas subtenantoj. Kvar anoj estas delegitoj de UEA, unu sekretario de Aŭtomobilista E-Klubo.

## Lingvo - interhoma komprenilo

Ekzistas diversaj difinoj de la nocio LA LINGVO. Da ili estas tuta gamo, sur kies dekstra flanko estas la difino de d-ro Ben Johnson /1973-1637/ : "La lingvoj estas la genealogio de la nacioj". /La angla estas la plej evidenta ekzemplo por tiu ĉi difino/. Sed sur la maldekstra flanko de la gamo estas alia difino : "La lingvo estas la interhoma komprenilo", kiu lastatempe ricevas iom pli precizan formon, nome "La lingvo estas la rimedo por konatigi informojn". Sur ĉiuj punktoj de la terglobo vivas homoj, laborantaj pri la sama scienco aŭ teknika problemoj, ĉu eblas efika kunlaboro, se ili ĉiuj publikigas siajn laborojn en alia nacilingvo ?

La distribuado de la informoj okazas ankoraŭ nun per amaso de maltaŭgaj nacilingvoj. Sed la informadiko bezonas lingvon alian, precize planitan jam en la Panglotio de Komenio, la lingvon Zamenhofan.

Kontraŭ la latina, la angla nepre havas kelkajn avantaĝojn. Dank al sia origino, nome obla hibridiĝo inter diversaj keltaj, germanaj kaj romanidaj lingvoj, ĝi perdis dum sia historio multajn gramatikajn ŝlikataĵojn, kiuj sin montris senutilaj /la tri genrojn de la germana, la komplikigan konjugacion de la franca/. Sekve ĝi povas facile formi kunmetaĵojn kaj derivaĵojn kaj adopti alilingvajn vortojn mallongigante ilin.

Sed kontraŭ tiuj kelkaj avantaĝoj oni devas starigi ankaŭ la malavantaĝojn, kiuj estas sennombraj. La lingvo havas nenian fiksan fundamenton, ĝi kreskis kaj kreskas arbitre kaj libervole. Sekve ĝia vortaro enhavas neimageblan inundon da sinonimoj kaj homonimoj: preskau ĉe ĉiu vorto en la vortaro oni trovas du tri aŭ eĉ tridek nociojn sen preciza difino. La gramatikaj reguloj kaj esceptoj atingas triciferajn nombrojn kaj ĉiam ankoraŭ kreskas. Laŭ la aserto de la anglico - oni bezonas 15 mil laborhorojn por atingi la plenan posedon, sed unuavice oni devas nepre vivi kelke da jaroj en Britio por ekregi la fonetikon kaj melodion de la lingvo.

Apartan ĉapitron meritis la nekredeble sensenca diferenco inter la skribado kaj parolado. Estas apenaŭ kredeble, ke la popolo, kies anoj malkovris la leĝon pri la universala gravito kaj inventis vapormaŝinon, ĝis nun ne rekonis la avantaĝon de la alfabeto, se tiu ĉi estas uzata unuece.

En la tempo de Komenio ekzistis internacia lingvo servanta al ĉiuj tiamaj kleruloj, nome la latina. Komenio mem perfekte regis kaj flue uzadis ĝin, lia tuta verkaro estas skribita en ĝi. Kaj spite al tio, post sia dumviva sperto li devis konstati, ke tiu ilo ne estas kontentiga. Oni devis esti tre kuraĝa viro por klare proklami tian "herezaĵon" en la tempo de la Sankta inkvizicio, ĉar la latina estis la lingvo de la katolika eklezio.

Hodiaŭ oni vivas en alia epoko, proksimiĝanta jam esence al multaj celoj de la pensado de Komenio. Oni havas ankaŭ la Internacian Lingvon de Zamenhof, kiu plenumas ĉiujn postulojn de Komenio kaj kiu estas elprovita per 87jara ĉiuflanka uzado. /fx/

APLIKI ESPERANTON DUM OLIMPIKO. Montreala Esperanto-Klubo alvokas ĉiujn esperantistojn spogi la ideon apliki E-on dum la Olimpikaj ludoj okazontaj en tiu ĉi urbo la venontan jaron. Skribu al: Président et G. Commissaire R. Rousseau S.E.C.O. Le Comité Organisateur des Jeux Olympiques de 1976, Case Postale 1976 Montréal, Canada, H3C-3A6 - samtempe sendante kopion de via letero al Montreala Esperanto-Klubo, 10617 Os-car Montréal-Nord P.Q. Canada H1H-5J8.

## RONDETA VIVO

**F R Í D E K** - LG aranĝas ĉiam la 3-an dimanĉon, krom ferioj, kur-estadojn en la "Kafejo Esperanto". La plano por 1975 antaŭvidas kelkajn geografiajn prelegojn pri Sovetio, Libano, Danlando. Funkcias du kursoj - por komencantoj kaj progresintoj.

**M Ě L N Í K** - La grupanoj preparas ekskurson al Várpalota/Hungario/, kie dum la printempa libertempo ili estos gastoj de siaj amikoj.

**M A R T I N** - La EK de M. Benka okazigis ĉi tie ekspozicion / 18.-31.1.75/ sub la titolo "Esperanto servas al nia socialisma socio kaj al la tutmonda porpaca batalo".

**P R A H A** - Koncerton okaze de la 50-jariĝo de la EK-ano d-ro Pravoslav Sádlo, la konata aktoro de la iama "Verda Ĉaro de J. Baghy", prezentis 20.1. en EKP la muzik-ensemblo "Collegium di flauti" en Praha /prof. J. Fantýš, J. Petzová kaj P. Sádlo/. La lasta akompanis esp. lingve la programerojn.

**Š U M P E R K** - Krom regulaj kursoj de E-o oni intencas en j. 1975 i.a. ligi kunlaboron kun la Distrikta Packonsilantaro, aniĝi al Nacia Fronto, pli bone informi la publikon pri la interlingvo, popularigi la gazeton PACO kaj komisiu unu reprezentanton por la junulara komisiono de ĈEA.

**Z Ť O J M O** - La 12-an de dec. okazis solena vespero omaĝe al L. Zamenhof, kiun partoprenis 19 esperantistoj.

## Kroniko

75 jarojn de sia vivo kaj 48 jarojn de sia aktiveco en la Ĉs. Radio festis 27.1. D-ro Dalibor Č h a l u p a, ĉefo de ĝia literatura sekcio, aktiva laborinto en la iama Verda Stacio.

La 50an jaron atingos en januaro-marto ges-roj: Milena Š k o d o v á, d-ro Pravoslav S á d l o kaj Josef M a r y š k a, ĉiuj el Praha. 55-jaraĝuloj fariĝos Renata D r a x l e r o v á kaj Jana M a - t u š k o v á, ambaŭ el Praha.

60-jariĝas Zora H r i v Ň á k o v á el Praha.

65-an jaron ĝisvivas Ladislav K y n ě l, aktiva komitatano de E K Praha.

70-jaran jubileon festas Tomáš P a v l í ĉ e k, la 75-jaran Anežka Š u s t r o v á, vidvino post la EKP-prezidanto J. Šustr, kaj Václav R u b e š, 80jara iĝas Anna H e j n o v á, ĉiuj el Praha.

Al la jubileantoj nian sinceran gratulon!

F o r p a s i s Bohumil N o v o t n ý en Liberec, longjara prezidanto de la tiea grupo,

Karel K o l á ř, sekretario de LG en Písek, aĝa 78 jarojn, post 1935 prezidanto de la klubo,

František O s l a d i l, lernejestro en Prostějov, aĝa 82 j. longjara sekretario de LG,

Anna M u s i l o v á, aĝa 72 j., en Poděbrady.

Honoron al ilia memoro!

## Malnova tradicio en Příbor



En la pasinta n-ro ni informis pri - verŝajne la unua laborista Esperanto-rondeto en la iama Austria monarkio, en la moravia urbo Příbor. Ni petis aldonan klarigon de la LG-gvidanto A. Sattek, kiu respondis jene:

En nia Esperanto-kroniko estas skribite: Estas interese, ke la proletaria internaciismo penetris en la konscion de la unuaj pioniroj de la socialisma movado en la urbo Příbor, kie en la jaro 1897 estis fondita socialdemokrata partio de Karel Š i t a v a n c, dometposedanto en Příbor-Benátky, n-ro 16.

La unuaj pioniroj de la socialisma movado kunvenadis en la gastejo "Mexiko". Dum unu komitata kunveno unu el ili proponis, ke oni lernu Esperanton. Tiu proponinto estis laboristo Josef K ť á n a. Lia propono estis unuvoĉe akceptita kaj samtempe kamarado Káňa estis komisiita mendi la lernolibrojn. Baldaŭ komenciĝis la instruado de Esperanto - en la gastejo "Lýsek" apud la stacidomo. La unua instruanto estis la laboristo S o u š a el Bystřice pod Hostýnem. Li estis meblisto kaj laboris en la vagonfabriko en Kopřivnice.

Post kvarsemajna instruado Souša ricevis leteron el Rusio de siaj amikoj kun sciigo, ke li devas ĉion forlasi kaj tuj forveturi al Rusio. La instruado daŭris en la domo de J. Káňa en Příbor-Veska.


Tiu ĉi dokumento estis kompilita laŭ rakontado de J. Kutáč, kiu mem estis ano de la unua laborista Esperanto-rondeto en Příbor.

## Saluto el Kubo

Plenuma Komitato de la pasintjare fondita Kuba Esperanto - Asocio, resumas en sia cirkulero la ĝisnunan internacilingvan agadon ekde la j. 1972. Tiam la kubaj esperantistoj starigis al si la celon konsciigi la publikon pri la malfacilaĵoj, kiujn sekvigas la multlingveco, kaj instrui Esperanton al grupoj de laboristoj kaj studentoj. Hodiaŭ oni povas diri, ke la rezultoj estis ambaŭflanke sukcesaj. Post mallonga tempo vastiĝis la adeptaro de IL energie popularigante sian celadon ĉe la publikaj instancoj. Kuba Esperanto-Asocio konsistas precipe el junaj homoj. Ili, kun sia prezidanto Oscar O t e r o, agas konsciencie por la plua disvastigo de la ideo kaj por ties apliko en lande. Kun helpo de diversaj landaj kaj internaciaj organizaĵoj oni sukcesis i.a. fondi la asocian bibliotekon, kiu estas prizorgata en la ministerio de edukado kaj kiu per praktika laboro kontribuas al kresko de la movado. /k/



Membroj de KEA en  
Havano, Kubo



L.L.Zamenhof : PROVERBARO ESPERANTA. Alfabetigita kaj indeksigita de C.Rogister. Enkonduko kaj postparolo de G.Waringhien.

K.Walraamoen kaj L.Gabrieli : NI DEVAS VIVI. Poemoj. Antaŭparolo de J.Régulo.

L.Besucaire : EL LA VIVO DE BERTALA SENTAŬGULO. Maldeceta epizodaro. La prezo de ĉiuj tri eldonaĵoj de STAFETO estas 190 pesetoj aŭ 3,30 US dol. Recenzon de la lasta ni aperigos en Panoramo 1975/1.

La eldonanto J.Régulo skribis al la recenzontoj akompanan leteron, el kiu ni citas :

Estimata redaktoro,  
mi devas informe aldoni, ke sur la nefirman ekonomion, kiu apogas la STAFETO-eldonojn, lastatempe falis ne malmultaj suferoj ; la ĝenerala plialtigo de ĉiuj kostoj, kiu rapidigas nin al stato de ĉion manĝanta inflacio... Kvindekda libroservoj kaj libristoj konstantaj mendantoj, kaj aliaj kvincent amikoj afable akceptu mian dankon pro ilia daŭra subtenado, kaj la prezaltiĝon, kiun mi devas hodiaŭ anonci.

Mi mem presas novan Katalogon de miaj eldonoj, kie ĉiuj libroj eldonitaj ĝis 1969, ankoraŭ ne elĉerpitaj, ekde nun estas vendataj je duobla /rondigita/ prezo ol la ĝisdataj ; kaj la aperintaj post tiu ĵaro provizore konservas siajn originalajn prezojn.

Mi nun ekprovas ofsetan presadon, espereble iel aŭ tiel mi povos lanĉi la jam akceptitajn titolojn kaj poste eventuale akcepti aliajn, se tiu nova vojo montriĝos praktikebla.

Juan Régulo

ETNOGRAFIAJ DONITAĴOJ. Fremdlingva eldonejo, Hanojo 1974, 350 pĝ. Vere riĉa fonto de informoj pri la etnaj grupoj en Vjetnamio kaj pri la nacia vivo ĝenerale. La priskribo verkita de kelkaj fakuloj redonas kompletan bildon pri diversaj aspektoj de la alte evoluinta kulturhistorio de la vjetnama popolo, kiu pli bone komprenigas la nuntempan socialisman kulturon enkadre de la multnacieca ŝtato. Plua valoro fakte en la traduka Esperanto-literaturo.

Saotome Katumoto : DANJO EN VJETNAMIO. Esperantigis kaj eldonis Ikebukuro Esperanto-Societo en 1974. Ilustraĵoj de Endo Toruyo, 46 pĝ. Mendebla ĉe CEA.

Temas pri la travivaĵo de kompatinda, sed brava knabino dum la milito vjetnama. La sorto de Danjo tuŝas la koron de ĉiu vera pacamananto pro sia profunde humanisma misio. La eldonintoj memorigas, ke du jarojn post la pakontraktoj pri Vjetnamio oni ankoraŭ konvinkigis, pri la militfajro tie kaj en la mondo ĝenerale. La libreto repensigu pri la krueleco de la milito kaj pri la alta valoro de la paco.

Inter la aliaj eldonaĵoj ricevitaĵi ni listigas :  
NE ĈIAM - originalaj poemoj de Wouter Pilger, AMORO KAJ AMO - tradukoj el la renesanca poeto P.C.Hooft, ESPERANTO PROGRAMITA de H.Behrmann, depresaĵo de la 1-a leciono, sveda eldono, MEDICINISTAJ INFORMOJ de ĈEA, n-ro 5-6/74 en la nova vesto /ofsetita/. Redaktas d-ro J. Hradil. /Pluraj korektendaĵoj troveblaj/.

VOĈO DE LA LEGANTO: "Kvankam mi ne plu estas prezidanto ke estrarano de TEJO mi ĉiam kun intereso trafollumas vian organon. Ke la Nova Jaro alportu al via laboro en Ĉeĥa E-o Asocio novajn sukcesojn".  
D-ro Hans M. Maitzen.

## Geografiaj nomoj en Esperanto

Tiu temo estis jam multe diskutita kaj ĉiam reaperas pri ĝi novaj opinioj. Antaŭ kelkaj jaroj aperis mapo de mondo en Esperanto kaj en nia lando estis eldonita la plaĉa kaj riĉa Poŝatlaso de mondo. Kvankam tie uzitaj terminoj por geografiaj nomoj parte malsamas kaj ne estas oficialigitaj, tamen la esperantistoj grandparte direktas sin laŭ ili. Dume ekzistas ankoraŭ ie nekonvenaj duoblaĵoj, kiel Israelo kaj Izraelio, Egiptio kaj Egipto, Vjetnamo kaj Vjetnamio, sed espereble post ia tempo ĉi tie ekregos ankaŭ unueco.

Sajnas, ke pri unu principo estas jam klare : ke ĉe formado de geografiaj nomoj, precipe de landnomoj, ne decidu ia ŝovinisma aŭ nacia vidpunkto, sed internacieco de la elektota nomo. Tial venkis la pli internacia Finnlando antaŭ la de iuj finnoj proponita Suomio kaj kreigis nomoj Hungario, Germanio kaj ne eble Madjario aŭ Dojĉlando k.s. Estis eĉ iuj, kiuj volis trudi nomon Ĉefio por la landnomo Bohemio, deduktante ĝin el la nomo de polano ĉefo. Post la unua mondmilito estis en ĉiuj naciaj lingvoj akceptita la nomo ĉefo kaj la nomo bohemo el la antaŭmilita tempo fariĝis arĥaismo. Sekve ĉefoj estas bohemiaoj, moravianoj, silezianoj, kaj Ĉefio estas la tuta teritorio loĝata de ĉefoj, do la tri landoj, dum Slovakio estas la lando loĝata de slovakoj.

Pri nomoj de urboj, riveroj, lagoj, montoj k.s. oni ĝis nun plejparte direktigis laŭ principo : en la adresojn kaj tekstojn parte destinitajn ankaŭ por neesperantistoj /poŝtistoj, klientoj k.s./, oni skribu tiajn nomojn en ilia originala ortografio, do Budapeŝto, Vieno, Warszawa, Munĉeno, Londono, Praha, Bratislava ktp. En Esperanta literaturo, gazetartikoloj, simple en tekstoj destinitaj nur por esperantistoj, oni prefere uzu la esperantigitajn formojn, kie ili jam estas kaj hejmiĝis : Londono, Varsovio, Vieno, Munĉeno, Prago ktp. Ĉar jam ĉiuj derivaĵoj estas pli praktikaj, do pragenoj, vienanoj, varsoviaoj estas pli oportunaj ol Praha-anoj, Warszawa-anoj, Wien-anoj Wien-a ktp. Tamen tio estas uzebila nur ĉe relative malmultaj grandaj urboj / aŭ lokoj por E. iel gravaj, kiel ekz. Bjalistoĵo k.s./, ĉe riveroj komunaj al pluraj landoj, kiel ekz. Danubo, Elbo, Rejno. Aliaj geografiaj nomoj estas uzataj en ilia originala formo kun aldonado de proksimuma prononco aŭ fonetika transskribo ĉe lingvoj, ne uzantaj latinan alfabeton : Trinec / Trjinec /, Nobeoka k.s.

Do ĉiu povas uzi, kie ekzistas jam la Esperanta formo, ankaŭ paralele la neesperantigitan nomon Munĉeno, Vieno, Praha, Paris k.t.p. Kompreneble ne en sia nacia lingvo, sed en tiu de la koncerna lando do tradukante el la ĉeĥa neniam uzu nomojn kiel Bráždany, Postupim, Mnichov k.s., sed aŭ Dresdeno, Potsdam, Munĉeno aŭ la preferindajn Esperantajn formojn, kie ili ekzistas, Dresdeno, Munĉeno, Potsdamo, Prago ktp.

Por ni ĉiuj kara nomo de nia ĉefurbo Praha havas la paralelan Esperantan formon Prago. Iujn ĝi eble rememorigas pri la periodo germaniga en nia historio, kiam oni trudadis al ni la nomon Prag. Sed tio nin ne trompu kaj fortimigu. La radiko Prag estas sendispute plej internacia, kvankam eble devenanta el la latina. Ĝi estas ne nur en ĉiuj ĉefaj europaj lingvoj / angla, franca, itala, germana, hispana /, sed ankaŭ en la slavaj lingvoj / rusa, bulgara, pola k.s./ estas Praga. Do ĝi estas maksimume internacia. Ni ne timu ĝin uzadi. Kompreneble paralele apud nia Praha.

Jiří Kořínek



Foje palpante en publika biblioteko mi trovis tie la verkon de Pavel Eisner: "Katedralo kaj bastiono" / Ĉefe: Chrám i tvrz / La verko ŝajnis al mi tro spacenhava kaj mi nur bezite prunteprenis ĝin. Sed mi ne bedaŭris. La lego estis vere festa ĝuo. Nun mi al ĉiu ĉefa esperantisto, ĉu verde freneza aŭ en duboj dronanta aŭ jenjene balanciganta inter antagonismaj argumentoj, rekomendas legi tiun ĉi verkon. La aŭtoro tiel kaptos lian intereson per sia unika majstreco, malkovrante trezorojn de la ĉefa lingvo, ke li kapablos pretersalti eĉ ne unu ĉapitron, ĉar ĉiu prezentas memstaran eseon, glorigan apoteozon al la ĉefa lingvo.

Unue ni rememoru la aŭtoron mem. En la ĝenerala leksikono ni povas informiĝi, ke Pavel Eisner /1889-1958/ estis ĉefa-germana verkisto kaj tradukisto, fakulo pri la germana literaturo en la ĉefaj landoj, aŭtoro de studoj kaj eseoj pri literaturo, muziko kaj lingvaj fenomenoj, tradukisto de la ĉefa literaturo en la germanan kaj de la germana literaturo en la ĉefan.

Vere, escepta homo. Rara. Ne multaj ĉefoj aŭ germanoj en la dulin-gva zono atingis tian ŝtupon, kaj lingvan kaj etikan. Pavel Eisner direktis sian vidkapblon tre, tre malproksimen, malantaŭ la naciajn barierojn kaj antagonismajn historiajn sentemojn.

Ni, esperantistoj, bone kaj fikse enkapigu: Eisner, Klostermann, Stifter, Zeyer amis kaj la ĉefan kaj la germanan lingvojn. Sekve: se ni volas fariĝi vere bonaj esperantistoj, ni devas profunde ami ankaŭ nian lingvon gepatran. Iom kontraŭdiraj estas la asertoj, ke neniu povas ekposedi alian lingvon same bone kiel la gepatran, ke la alia ĉiam restos neasimilata. Ankaŭ Pavel Eisner iam inklinis al tiu ĉi aserto, kvankam lia vivdaŭra verkaro konvinkas pri la malo.

Eseence mi volas akcenti kune kun Pavel Eisner, ke la beleco estas subjektiva, tamen substancia ornamo, per kiu karakterizas la lingvon ĝiaj uzantoj. Se la homon ekposedos revanta amo al la beleco de iu lingvo, tiam tian aferon ni ne povas viciĝi inter fizikajn fenomenojn. Jes, la lingvon neniam plene interpretos komputero, ĉar ĝi neniam kapablos ekposedi la viveman amon de estuloj. Mem la kreinto de la cibernetikio, Norbert Wiener, diras: "Se venus esploristo el alia mondo, kiu nenion scias pri la estula amo, li priskribus ĝin kiel strangan, danĝeran malsanon, kiu kaŭzas eĉ memmortigon kaj murdon".

Pardonu, vi, sekaj polurantoj de la klasika lingva heredaĵo, kaj ankaŭ vi, pedantaj ĝerdantoj de la ostiĝinta, senkerna lingva herbario ke mi jubilas ankaŭ antaŭ freŝa lulkrio, ke mi kuragas elverŝi antaŭ ĝi tute simplanime mian ameklaron. Ĝin instigis Pavel Eisner, ĉefa germano kaj germana ĉefo, kiu ne serĉis la lingvajn trezorojn en palacoj, sed surstrate, ensere. Eble li eĉ ne ŝatis Esperanton. Kiu scias? Sed li ardigis mian amon al mia gepatra lingvo kaj pravigis ankaŭ mian amon al mia "bolingvo". Kaj ĉu la lingvo, sanktigita per geedza ĵuro, ne transpasas la gepatrajn influon kaj horizonton?

Peon

## Lingvaj baroj por ĉiliaj patriotoj

SinJORINO H. Allende, vidvino post la heroe falinta eksprezidento de Ĉilio, S. Allende, vizitante Ĉeĥoslovakion, diris i.a. dum la preskonferenco en Praha la 21an de januaro, ke "la plej serioza problemop por la politikaj rifuĝintoj antaŭ la ĉilia ŝunto, vivantaj en Eŭropo, estas la lingva diverseco". Tiun ĉi konstataĵon s-ino Allende enkondukis per la vortoj, ke la ĉiliaj patriotoj povas senĝene rifuĝi al ĉiu j socialismaj ŝtatoj.

## Kiam ni batalu ?

Sekvanta fragmento estas el la publikaĵo "Ĉapitroj pri la sindefendo" de I. Špička kaj J. Novák, tradukita en Esperanton far J. Novák.

Ni imagu sinJORON X, kiu iras vespere hejmen tra iu nemulte lumigata kaj preskaŭ forlasita strato. Estas agrabla antaŭvespero, sinJORO X pensas pri bona vespermanĝo kaj kompreneble atendas nenion malbonan. Subite li estas haltigita de nekonata viro, kiu volas ekbruligi sian cigaredon. Plue, sinJORO X memoras nenion. En malsanulejo estis li informita, ke li estis insidatakita, frapita sur la kapon kaj pri-rabita. La paciento iom post iom rememoras la okazintaĵojn de tiu vespero, sed detalon li rememoras malrapide kaj ĝene.

Tamen la situacio povas evolui ankaŭ alie. SinJORO X povis eventuale rimarki, ke li estas sekvata de nekonata viro, kiu paŝo post paŝo pliproksimiĝis. En la momento, kiam la nekonatulo atingis lin, sinJORO X turniĝis. La atakonto, ni jam povas nomi lin tiel, kaptis lin krude je la kolomo kaj postulis monon. Poste sinJORON X, kiu havis ĉe si nur dek kronojn, la seniluziigita atakinto kolerege surterigis per pugno.

Estas ankaŭ eble, ke sinJORON X haltigos en parko grupo de junuloj. Ili antaŭe ĝenos lin, ofendos lin kaj fine li estos batita, nur pro amuzo de la atakantoj.

Ni ekmeditu nun pri la tri menciitaj ekzemploj, kiel naskiĝas la situacioj sindefendaj. Kion povas fari sinJORO X? Kial li faris eraron? Tio estas la unua, kaj ni diru rekte, ofte la plej decidiva ŝan- zo de la tuta batalo. Ĉi tie tre gravas la tn. produktado de la sin- defenda situacio. Kia estis la unua grava eraro de sinJORO X? Unu el la plej gravaj postulatoj de monosignala sindefendo estas: la defendanto devas per sia propra konduto sekurigi al si sufiĉan tempon, por ke li povu prepari sin al la batalo.

Pro tio sinJORO X, revenante hejmen tra la krepuskiĝinta strato, ne devis permesi, ke nekonata homo proksimiĝu al li. La truko kun albruligo de cigaredo estas cetere tigrade malnova, ke nur tre naŭva ho- mo povas preni ĝin serioze. Ankaŭ en la kazoj, kiam la nekonatulo de- mandos nokte en flanko kuŝanta loko pri la vojo, klopodos ekinterpa- roli ktp., ni ĉiam povas teni almenaŭ tian distancon de li, ke li ne povu ekataki nin sen plua alpaŝo. Tamen pri la sekura distanco ni de- vas atenti ankaŭ en aliaj kazoj. Pro tio ni neniam iros hejmen tro proksime preter dikaj arboj, malantaŭ kiuj povus kaŝi sin la atakon- to, ni evitos ankaŭ la veturtrapasejojn, la murojn, de sur kiuj povus iu salti sur nin aŭ almenaŭ ĵeti ion ktp. Se estos eble ni iros meze de la strato aŭ almenaŭ laŭlonge de la trotuara rando. Tiel ni havos sufiĉe da tempo por prepari nin al eventuala batalo.

## Esperantista gazetararo 85 jara

En septembro 1974 pasis 85 jaroj de post la apero de la unua peri- odaĵo en E-o, "La Esperantisto", presita en Nurenbergo. Ĝis hodiaŭ jam aperis proksimume 2500 titoloj de diversaj revuoj k.a. el kiuj nun- tempe aperas ĉ.150, ne kalkulante multnombrajn cirkulerojn kaj bul- tenojn.

Okaze de tiu ĉi jubileo la Scienca Antikvaĵejo en la pola urbo Byd- goszcz aranĝis ekspozicion "85 jaroj de la Esperanta gazetararo" /21.- 25.11.1974/, kiu enhavis preskaŭ cent diversajn revuojn. Inter ili estis ekspoziciataj ankaŭ "Starto" kaj "Esperantisto Slovaka".

# INFORMACE SEKRETARIÁTU ČES

KOLIK NÁS BYLO KE KONCI ROKU 1974 ?

Vydali jsme legitimace až do čísla 3687 -- Platících členů je však pouze 2300. Na Slovensku je přibližně 800 platících členů ZE SSR.

Za měsíc leden 1975 bylo přijato více než 50 dalších členů, vesměs kategorie A,B,C. Přitom téměř 65% stávajících členů si do konce roku 1974 obnovilo členství ve svazu zaplacením příspěvků na rok 1975. Z těchto příspěvků jsme ponechali pro potřebu místních skupin 10 %. Včasným plněním svých povinností vůči svazu pomáháte tedy i svému kroužku.

Budeme mít pravděpodobně možnost dovézt menší množství Plena Ilustrita Vortaro /PIV/ - žádáme vážné zájemce, aby zaslali objednávku. - Cena zůstane nezměněna - 550 Kčs.

VAŠE KNIHOVNIČKY si můžete doplnit novinkou z VDR. Má název " ETNOGRAFIJ DONITAJOJ ", rozměry 130 x 190 mm, stran 352 a cenu 10 Kčs. Z Polska knížечku: POLLANDO nombroj kaj faktoj za Kős 5,-

Protože toto číslo posíláme všem místním skupinám ZE SSR a věříme, že si je přečte co nejvíce slovenských esperantistů, upozorňujeme na možnost objednat si u nás různé knížky, odznaky, plakáty na propagaci esperantských kurzů, esperantské vlaječky, pohlednice ČSSR, propagační samolepky, vánoční gratulace a další materiály; rovněž lze u nás předplatit tyto esperantské časopisy :

| P A C O                        | předplatné na rok | 30,- | vydává | Bulharsko  | 6x ročně |
|--------------------------------|-------------------|------|--------|------------|----------|
| HOMO KAJ KOSMO                 | "                 | 40,- | "      | Jugoslávie | 4x "     |
| DER ESPERANTIST                | "                 | 12,- | "      | NDR        | 4x "     |
| DIA REGNO                      | "                 | 35,- | "      | Holandsko  | 6x "     |
| HEROLDO DE ESPERANTO           | "                 | 88,- | "      | Belgie     | 16x "    |
| STARTO /16 stran/              | "                 | 25,- | "      | ČSSR       | 6x "     |
| MEDICINISTAJ INFORMOJ          | "                 | 25,- | "      | ČSSR       | 4x "     |
| PANORAMO /literatura almanako/ | "                 | 25,- | "      | ČSSR       | 2x "     |
| JUNA AMIKO                     | "                 | 15,- | "      | Maďarsko   | 3x "     |

NEZAPOMEŇTE PSÁT NA SLOŽENKY "účel platby". Velice nám tím usnadníte naši práci s evidencí a urychlíte vyřízení vaší objednávky.

Všichni, kdož se přihlásili za učitele písemných kurzů, nechť vyčkají dalších pokynů. Kurz je vypracováván. Pro adepty připravujeme také zvláštní zkoušky. Teprve potom bude rozhodnuto o přijetí kandidátů

Rovněž přijímáme přihlášky na svazovou zkoušku, která by opravňovala vyučovat v kurzech u nás i v zemích, kde uzavřeme příslušné dohody. Upozorňujeme však, že bude náročná jak obsahově tak i finančně. Zkoušky tohoto druhu se budou konat maximálně dvakrát v roce.

PŘIHLAŠTE SE NA LETNÍ KURZY ESPERANTA DO NAŠICH TÁBORŮ V LANČOVĚ U VRANOVSKÉ PŘEHRADY! ČTRNÁCTIDENNÍ POBYTY OD DRUHÉ POLOVINY ČERVENCE! VELMI LEVNÝ POBYT ! STRAVA ŠKRÁT DENNĚ. ŽÁDEJTE PROSPEKTY ! ! !

DOBROVOLNÉ DARY : P.Bulíková 36, Mar.lázně, J.Hošek, 2xSKP, Ostrov n. Ohří, E.Čapek 20, Mělník. Srdečný dík ! Th.Kilián, Třebíč 1.000,-

## Korespondi deziras

Por siaj gelernantoj serĉas leteramikojn A. Kilk, Aarde 4-4, 200032, Tallinn, Estona SSR • W. Jakubiec, 21j. lernanto, 63-312 Wrocław, st. Drukawska 4, ap.30, Pollando • Penka Mihailova 31j. Beron 17, Kazanlak, Bulgario • 200 seriozaj esperantistoj-filatelistoj kun kolegoj tutmonde /Sofia 13, PK 5, Klubo Amika Rondo/ • Stefano Jo b, 9029 Győr, Boglarka str. 55 Hungario /geedza vivo, amrilatoj/ •

30 Estonaj gekomencantoj, 17. - 45j. aĝaj kun ĉefaj kaj alilandaj esperantistoj per poŝtkartoj kaj malgrandaĵ leteroj. Kursgvidanto : A. Mikk, SU-202900, Viljandi, str. Jakobsoni 3-2, Estona SSR /ni dankas pro la novjaraj bondeziroj/ • Tatjana Anderskaja, 22j. biologo, O-deŝsa - 270100, str. Korolenko 5-B, kv.26, SSSR

Kultura domo de la sindikatoj, Esperanto-rondo, str. Balcescu 1, Suceava 1, Rumanio kun s-anoj el ČSSR • M.P. Dungeanu, P.O. Box 502, Suceava 6, Rumanio • F-ino L. Branciú, 18j. lernantino, Liceul Sanitar, Suceava 5, Rumanio, kun ĉs. esperantistoj • F-ino Simioniu Cheorghie, 18j. lernanto, Liceul Petru Rareș, Suceava 1, Rumanio • F-ino Ciobanu Florentina, 17j. lernantino, str. Plevnei 115, Suceava 3 Rumanio • Studenta Esperanto-Klubo ĉe Agrikultura Akademio Wrocław / adr. SE-K, A.A., 50-375 Wrocław, str. Norwida 25, Pollando /kun similaĵ kluboj ĉe agrikultura aŭ veterinara fakultatoj.

BILDKARTO "Pozdrav z Moravy" - eld. Orbis-POFIS, prezo Kős 1,30 kun kolekto de koloraj poŝtmark-reproduktaĵoj enhavas 2-kronan markon /VŽKG/ kiu surhavas esp. tekston "Tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj" /Praga 1962/ /jm/

TEKNIKA SEKCIO DE ĈEA komunikas ke laŭ la aprobo de la ĈEA-estaro estis elektita la nova prezidanto de la sekcio, d-ro ing. Ludvík F r i t s c h, ul. M. Gorkého 11, 370 01, České Budějovice.

Skribante al redaktoro de STARTO aŭ al la MEM-sekcio oni bv. direkti ĉiujn korespond-aĵojn al la asocia sekretario.

DENOVE KONKURSO DE P.R. En 1975 pasos la 30a datreveno de la finigo de la mondmilito. Okaze ni petas respondi al jena demando : Kiaj pensoj venas al vi lige kun la proksimiĝanta 30a datreveno ? La leterojn oni petas sendi al : Polskie Radio, 00-950 Warszawa, P.O.Box 46, Pollando en kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso " ĝis la 9-a de majo 1975. La rezultoj estos anoncitaj en la disaŭdigoj de PR la 15an de junio.

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA /ISAE/ petas siajn aktivulojn en Ĉeĥoslovakio renovigiĝi an membrecon per registra letero al la nova landa delegito, d-ro Josef H r a d i l, 295 01 Mnichovo Hradiště, V. Nejedlého 325.

NI AL VI PROPONAS :

"PAŜOJ"

PERDITA VIZAĜO

AĈETEBLAJ POR 19 Kčs

POR 15 Kčs

Esperanto - rondo  
Vyškov, Školní 4



|   | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|----|----|----|----|----|----|----|
| A |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |
| B | B | A | O | S | O | S | T | I | L | E  | T  | E  | S  | T  | A  | L  | K  |
| C | I | C | N | O | R | K | T | E | R | L  | E  | T  | E  | S  | T  | A  | L  |
| D | U | R | A | N | S | U | K | I | N | T  | R  | A  | N  | A  |    |    |    |
| E | N | O | V | E | E | L | O | R | K | M  |    |    |    |    |    |    |    |
| F | E | T | A | D | E | T | O | M | A | K  | O  |    |    |    |    |    |    |
| G | A | R | E | N | J | A | K | S | A | P  | A  | R  | M  | R  |    |    |    |
| H | E | A | K | A |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |
| I | E | N | A | M | A | N | P | A | U | L  | A  | V  | A  |    |    |    |    |
| J | E | O | J |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |
| K | A | K | T | A | E | I | K | E | P | U  | N  | E  | S  | E  |    |    |    |
| L | E | T | I | L |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |

Horizontale : A/ Tri a  
parto de la se-  
kreta ĵo. - B/ Paniko;  
malgranda ponardo; arb' kun  
flekseblaj branĉoj - C/ Mal-  
atent; koloni' de maraj a-  
nimaloj kun kelka krusto; ne-  
tro manipuli - D/ Venteg;  
fluaĵ en organo; mallongigo  
de "internacia"; maloft; me-  
ritanta - E/ Interplektaĵ;  
sur ligilo; kruda ĥestahaut  
oka parto de tuto; moviĝ de  
ŝipo per plataj bastonoj; ne-  
difinita kvanto. - F/ Malgranda;  
posteul; korpa organo por

digesto; kemia signo de la tantalo; malnova longec-unu - G/ Lok por bat-  
talo en cirko; temp-unu; ŝaumiga lavo-ŝtof; duop; senti surprizon - H/  
Malmola haŭto-part; foje en pasinto; venena plant' uzata en okul-krec-  
ado; stri' ĉirkaŭ la talio; mallongigo de la Kamboĝa pres-agentejo - I/  
Id-naska estaĵ; parola instig; franca urbo; perakva purigad; nedifi-  
nita aĵo - J/ Matena vapor-gut; prepozicio signifanta "interne"; kun-  
ir; - Drampart; atmosfer; denova rekompenc de kulpo; mallong a  
traktaĵ; trinkaĵa - L/ Esprim-manier; brazila poeto.

Vertikale : 1. Unua parto de la sekreta ĵo /  
proverbo laŭ Zamenhof. - 2. Tempunuo; 21-a litero de la Esperanto-  
alfabeto; pasig de nokto. - 3. Malnov-grek; daŭra aŭ ripeta; eks-  
pozicio kun signifo "eksteren"; itala urbo. - 4. Amerika ŝtat; mal-  
komenc; malfacile atingebla perfektec. - 5. Eta truet en haŭto; k  
vara parto de la sekreta ĵo. - 6. Kontakten ge-  
ometrio; idento; sumiga sufikso. - 7. Provizo; autosigno de Tur-  
kio; kroĉileg' por fiksi ŝipon. - 8. Mantreni; acet-valor; usona  
verkisto de detektiv-romanoj - 9. Flugmaŝina signo de Liberio; mem-  
bro; part de oceano; mallongigo de la Madagaskara pres-agentejo. -  
10. Triangula enfluej de rivero en maron; legomo kun manĝebla radi-  
ko; mallongigo de la internacia poŝt-unio. - 11. Bonodora rapide va-  
poriganta fluaĵo; mallongigo por fizika fort-unuo; projekt. - 12.  
Grup da ĉirkaŭaliaj strioj; apartenanta al izola loko en la dezerto  
kun vegetaĵoj; negacio. - 13. Mallongigo de la Internacia glitista  
unio; kvina / kaj la lasta / parto de la se-  
kreta ĵo. - 14. Senbarbigi; laktiga korp-organ; movebla part  
de tekmaŝino. - 15. Vic-du da arboj; autosigno de Nikaragvo; nedi-  
finita kvalita; indiki tagon kaj jaron. - 16. Arbara bird; sekve;  
apartenanta al tropika granda floro. 17. Dua parto de la  
sekreta ĵo.

HELPILO : C/Koralen' - H/AKP - I/Pau - L/Dias - 3. Ion'; Asti - 6. Os-  
kul - 9. EL; AMP - 14. Naved' - 16. Sit J. Cink

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Resp. redaktoro. Old-  
řich Kníchal. Redakta konsilantaro : E. Felix, J. Mařík, F. Sviták.  
Grafika arango J. Klement. Aperas sesfoje jare. Dohl. poŝta Praha  
07, sniž. poŝt. poplatek pov. RP Praha j.z. F/1 - 2283/1971. Toto  
číslo bylo předáno tiskárně 19. února 1975. Desejno sur la 1-a pĝ.  
de D. Bartošík.